Jura Semajno

Semajna Bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Novembro 3 : 2025

# FINIĜIS LA PROCESO KONTRAŬ LA ĜENERALA ŜTATA PROKURORO EN LA HISPANA SUPERA KORTUMO



S-ro Álvaro García Ortiz,
hispana ĝenerala ŝtata prokuroro.

Ĉi-semajne finiĝis, ĉe la Hispana Supera Kortumo, juĝa proceso kontraŭ la ĝenerala ŝtata prokuroro. La kazo komenciĝis antaŭ kelkaj jaroj, kiam oni diskonigis publike konfidencajn impostajn datumojn pri privatulo, kiu estas kor-amiko de politikisto kontraŭa al nuntempa hispana registaro. Tiuj datumoj enhavis konversaciojn inter advokato kaj la fiska departmento. La ĝenerala prokuroro estas akuzita dum la polica esploro kaj nun okaze de la juĝa proceso, ke li respondecas pri tiu kontraŭ-leĝa diskonocigado, kun la celo damaĝi la kontraŭan politikiston. Malgraŭ konstanta premo de la hispana socio kaj amas-medioj, la ŝtata prokuroro ne demisiis antaŭ la proceso.

Dum du semajnoj sinsekvis ĉe la Supera Kortumo demandado al atestantoj kaj montrado de dokumentoj, kiuj helpos decidi la profesian kaj proceduran futuron de la ŝtata hispana prokuroro. Kompreneble, oni ne povis eltrovi klare, ke li estis la respondeculo de tiu publikigado de privataj dokumentoj, ĉefe pro la fakto, eltrovita de la polico, ke la prokuroro forviŝis datumojn de sia portebla telefono en la sama momento kiam oni decidis malfermi polican esploron pri tiu afero. La prokuroro atentigis, ke li forviŝas datumojn de sia telefono de tempo al tempo, do, laŭ lia deklaro, li neniel deziris malaperigi pruvojn kontraŭ li.


Tamen, tio kio ja estis pruvita dum la proceso, estas la fakto, ke la mesaĝoj ekzistantaj inter la advokato de la privatulo kaj la fiska departmento estis urĝe petitaj de la ŝtata ĝenerala prokuroro mem kaj poste anonime senditaj al ĵurnalaro. Laŭ akuzanto dum la ĵusa proceso, tio pruvas la respondecon de la ŝtata prokuroro, tamen la defendanto asertis, ke ne ekzistas senduba pruvo pri tiu respondeco de la akuzito.

Kiel kuriozaĵo oni devas elstari, ke la prokuroro aganta dum la proceso troviĝas sub la ordonoj de la ĝenerala prokuroro, akuzita dum tiu proceso. Do, prokuroro ne akuzas, male, li defendas la akuziton. La sola akuzanto dum la proceso estas la advokato de la privatulo pri kiu oni diskonigis konfidencajn impostajn datumojn.

# *Vorto de la Semajno*

## DENUNCI

Sciigi al estro, policano, juĝisto,
aŭ al la publiko, ies kulpon aŭ krimon.




**DENUNCANTO**: homo kiu denuncas.

**DENUNCITO**: homo akuzita pro denunco.

**DENUNCO:** ago de denuncanto.

**DENUNCEBLA:** ago kiu meritas esti denuncita.

<u>Sinonimoj</u>: *akuzi, kritiki,*

*Li denuncis sian malamikon pri ŝtelo.*

**INTERNACIA JURISTA ESPERANTO MOVADO**

**www.esperantojuro.org**

**jurista@esperanto.ac**